.

& Senordaj pensoj de l' eksa pesimisto:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 390 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Valentin Melnikov (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:65> (o;So /dodo dore mi so;so lafa redo Ti So;So doTi dore mi so;so lafa reTi do o;so lafa redo Ti SoTi doTi dore mi so;so lafa redo Ti SoTi mimi mire do

(#Rekantaĵe: o;So dodo dore mi so;so lafa redo Ti So;So doTi dore mi so;so lafa reTi do o;so lafa redo Ti SoTi doTi dore mi so;so lafa redo Ti SoTi mimi mire Tire do)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 De /kie ŝi aperis? Miraklas la evento, ; ke dum despero pleja ŝin sendis la fortun'. ; Kaj tuta vivo povas ŝanĝiĝi dum momento – ; ĉu multo bezonatas por la feliĉo nun?

(×:; **Ho, dancu nun kun ĝojo ; kaj gaje kantu laŭte ; kaj saltu sur la vojo ; de plenespera viv'; Ho, dancu nun kun ĝojo ; kaj gaje kantu laŭte ; kaj saltu sur la vojo ; de plenespera vigla viv**'.)

'2 Bosket' ĉe laga bordo similas al Edeno: ; sub sun' karese varma en posttagmeza hor' ; ne ligas ŝian belon malseka ŝtofkateno – ; la korp' ne idealas, sed indas je ador'. .....

'3 Pri sekva renkontiĝo – ne certo, nur verŝajno. ; Atendo dum monatoj, sopiro ĝis turment'. ; Leter' aŭ telefono, sendorma nokt' en trajno, ; kaj – ĝuo de l' revido. Benatas la moment'! .....

'4 Mi ŝvebas en etero, sen movoj kaj sen fortoj, ; pro simpla varma tuŝo vanuas la real', ; sed kvazaŭ tra nebulo aŭdeblas ŝiaj vortoj: ; "Nu kial eĉ nuntempe vi seriozas, Val'?" .....

'5 Kaj se la vivo mornas – anstataŭ vero plenda ; aspiras mi denove al vivokrea font': ; Rideto vertikala – sendenta, sendefenda ; akceptas miajn kisojn kun ĝojo kaj sen hont'. .....

'6 Minutoj da feliĉo pli karas ol jardeko ; da vivo senimpresa, vegeto en rutin'. ; Se iu ajn edife balbutas pri la "peko" – ; meritas li kompaton: la viv' preteris lin! .....)